

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer

Provlegita de Vera Payne

PLENUMITA 03/08/2017 Tricent-tridek-tria eldono (unua eldono 20/09/2011)

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

[Google Translate](#)

[Plena Ilustrita Vortaro](#)

[Esperanta Retradio](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Ekstudis pli ol **960,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo

per la angla lingvo. (Ekde la 28a de Majo 2015) <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

Ankaŭ ekstudis pli ol **176,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde la 26a de Oktobro 2016)

Ĝis nun **1,136,000** lernantoj ekstudis Esperanton per Duolingo

La gramatikaj (lingvaj) kategorioj. D.



La bildo, la Propozicio, konsistas en Esperanto el nur kvar partoj, kvar specoj de funkcio en la kompleta bildo. Ni jam menciis la Subjekton, la Predikaton, kaj la Objekton. La kvara parto, la kvara speco, difinas la agon, la Predikaton, kaj tial havas adverbajn karakterojn. Ĝi nomiĝas Adjekto, ĉar ĝi estas "alĵetita" al la bildo, sed ne bezona, kaj multaj Propozicioj enhavas pli ol unu Adjektojn. Ili kune formas la kvaran parton de Propozicio. Estante adverbcaj, ili kutime sed ne ĉiam konsistas el Adverbo aŭ el adverbca Prepozitivo, ekz. "La viro batis la hundon forte per bastono apud la lago, hieraŭmatene, pro perdo de tagmanĝo."

En kaj pri etnaj lingvoj oni uzas kelkajn prigramatikajn terminojn malsame kiel en Esperanto. Ekz. la vorto "predikato", indikanta en Esperanto la agan parton de la propozicio, uzatas en kelkaj lingvoj por la tuta parto post la Subjekto, dum ili nomas la Predikativojn "komplementoj". En Esperanto ni uzas "Komplemento" por ĉiuj tri specoj de difinantoj ante al Substantivo, nome la adjektivon (= epiteto), la prepozitivan (= Suplemento), kaj la Subordan Propozicion. Do "La alta monto", "la monto apud la maro", kaj "La monto, kiu formas parton de la landlimo". En Esperanto ne ekzistas pli ol du kazoj nek la Nerekta Objekto, kiu estas unu el la Adjektoj.

(daŭrigota)

Marcel Leereveld.

“Malgrava historieto pri mia vivo” (Bob Felby)

Nun AE kopias la tutan libreton iom post iom ĝis la fino.

Bona rakonto kaj bona Esperanto**Ĉapitro 2, Mi plenkreskiĝas, fariĝas laboristo kaj esperantisto (1a ero)**

Mia patrino kuniris kun mi por aĉeti laborveston por mi. La postan tagon mi eklaboris en hufferfabriko en “Nørrebro”, t.e. la norda parto de Kopenhago. Mi estis tiam nur 13-jara, kaj la laboro estis multe tro peza por mi. Akcidente, ĉar mi ne multon komprenis, mi rompis unu el la maŝinoj tie. Tial du tagojn poste mi laboris en la “Kongelige Porcelænsfabrik”, t.e. Reĝa Porcelanfabriko en “Frederiksberg”, iama antaŭurbo, kiu iom post iom fariĝis enŝlosita en Kopenhago. Mia amiko, Hilmer, kiu povis bati tamburojn, kaj jam tamburis en marŝorkestro, jam laboris tie, kaj li rekomendis al mi la laboron. Mi restis tie kvar jarojn, farante telerojn kaj subtasojn.

Mi regule iris al la publika biblioteko, prunteprenis librojn, kaj legadis kaj legadis. La plej multajn librojn mi legis en la dana, sed de tempo al tempo mi legis ankaŭ kelkajn librojn svedajn, ĉar oni devas ja ĉiam lerni ion novan, ĉu ne? Kaj mi estas ja ankaŭ kvaronsvedo, ĉar mia patrino duonsvedas.

Pri la germana lingvo mi ankoraŭ havis multajn problemojn, same kiel hodiaŭ, kaj iun belan tagon mia patro rekomendis al mi, ke mi lernu la internacian lingvon, Esperanto. “Kio en la mondo estas Esperanto?” mi demandis, kaj li respondis, ke ĝi estas neŭtrala lingvo, kaj multe pli facila ol la tiama nepopulara germana lingvo. De kie li sciis tion, mi ne scias, sed li ja parolis kun multaj homoj dum sia laboro!

En la danaj gazetoj regule reklamis iu firmao nomita “Expanko”. “Expanko” estis plankolako, kaj multaj homoj dum jaroj kredis, ke Esperanto estas io, kion oni ŝmiras sur la plankon.

Mi estis membro de junularorganizaĵo kaj ĉiun monaton mi legis ĝian membrogazeton. En ĝi estis i.a. ankaŭ ĉiumonata leciono de Esperanto. Mi avide studis la lecionojn, kaj provis parkerigi ilin. La unua, kion mi sukcesis parkerigi estis la vorto “avo”. Hodiaŭ, 54 jarojn poste, mi mem estas avo, kaj du knaboj kaj iliaj gepatroj nomas min “Avo”. Du geknaboj nomas min “Farfar”, t.e. “patro de patro”, kaj unu malgranda ĉarmulino nomas mi “Riŝi”, t.e. juna princo en la sanskrita, sed kelkfoje ŝi nomas min “Grandad”. Mi honoras iom pli ol nur unu lingvon !

*Daŭrigota**Bob Felby***Ĉu vi subskribis la peticion?**

klaku ĉi tie

Se vi ankoraŭ ne faris, klaku kaj subskribu la verdan supran lokon.

Esperanto bezonas milionojn da nomoj. Kion faras la milionoj da Esperantistoj? Subtenu nin! Ĝis hodiaŭ nur **420** subskribis tiun peticion. (Por Esperanto, tiu peticio povus esti gravega,)*Roger Springer*



La Toowoomba Esperanto-Asocio (TES) kaj la Brisbana Esperanto-Asocio (BES)



TES & BES membroj kunvenas en ĝardeno de Linda & Petro Danzer



Ness kaj Erhard Claus kun Sofia (meze de)



Sabata tago ĉe la domo de Peter kaj Linda Danzer

informas
Peter Danzer





Ebriaĵoj Ŝoforoj

Kara Roger, en la numero 332 de Aŭstraliaj Esperantistoj vi komparas la punojn por du ebriaĵoj ŝoforoj. Tiu, kiu estas "bonŝanca" esti haltigita de la polico antaŭ ol li kaŭzas damaĝon, ricevas "nur" monpunon. Tiu, kiu estas tiom malbonŝanca vundi aŭ eĉ mortigi homon, ricevas kelkajn jarojn en malliberejo. Vi demandas, ĉu la krimo ne estas la sama. Mi ne konas la aŭstralian juran sistemon, sed mi povas rakonti al vi, ke kaj en Germanujo kaj en Danlando ekzistas pluraj krimoj, ĉe kiuj la sekvoj de la krimo ludas rolon rilate al la puno. Vi eble pravus, ke la intenco de ambaŭ ŝoforoj estis la sama, sed evidente ne la sekvoj de iliaj kontraŭleĝaj agoj.

Por la kazo, ke vi volas doni la saman punon al ambaŭ ŝoforoj: Ĉu ambaŭ iru kelkajn jarojn en malliberejon? Tiam Aŭstralio verŝajne devos konstrui amason da malliberejoj. Ĉu la popolo opinios, ke la puno por la "nura" ebriulo estas justa? Ĉu ambaŭ nur havu monpunon? Ĉu tio estus kontentiga solvo?

Aldone: En Germanujo bedaŭrinde kelkaj junuloj aŭto-vetveturas en grandurboj. Ofte okazas akcidentoj. Nun unuan fojon juĝisto decidis, ke tiu ŝoforo, kiu mortigis homon, estu punita kiel murdisto.

Amike, **Peter Weide**

Mi rekomendas:
<http://esperanto-gramatiko.saluton.dk>

Eble la plej bona lingvo en la mondo

AMO EN EŬROPO –

EN CIRKONSTANCOJ TUTE MALSAMAJ

Recenzo per Vera Payne

Libro de Trevor Steele



Ravis al Barrie, Michele kaj mi la opereto *La Gaja Vidvino* kiun ni spektis ĉe *Lia Reĝa Moŝto* lastan semajnon. Direktoro kaj koregrafo Graeme Murphy prezentis belege brilan mondpremieron de ĉi tiu nova *Vidvino*, lokita ne en La Belle Epoque-aj Balkanoj sed en Art Deco-a Parizo. La tri scenoj (por la tri kontentige longaj aktoj) estis spirohalte allogaj, kiel ankaŭ la kostumoj. La kantistoj el la O.A. Opero-Kompanio, la muziko de Franz Lehar ludita de la O.A. Simfonia Orkestro (la kondukistino poneovostharara) kaj la profesiaj baledo-dancantoj, ĉiuj absolute ĉarmegis. Kaj, ho mia kor', la plej bone konata valso (*Lipoj silentas*, aŭ *Mi tiom vin amas*) ja 'kvazaŭ forprenis la animon de mia korpo' (mi ŝtelis tiun esprimon el P.I.V. kiu tiel vortprenas la verbon "ravi"). Se ĉi tiu evento venos al via ŝtato, nepre iru spekti ĝin, eĉ se la kosto poste devigos vivtenon nur per pano kaj akvo dum pluraj semajnoj; ĝi meritas la oferon.

Kaj de la subluma komedieto supre, mi dividu kun vi alian priamo-aferon kiu vin atendas – multe malplikoste kaj kiu estas pli pensiga. Tio estas *Amo Inter Ruinoj*, nova romaneto verkita de nia Trevor Steele. Multe pli serioza, lokita plejparte en Estonio, kun protagonistaj nomoj ne ĉiutagaj - krom tiu de *Trevis*, kies nomo supozigas, ke la aŭtoro skribis pri siaj propraj spertoj en orienta Eŭropo.

Jen, en ne granda libro, ampleksa historio-leciono koncerne la jardekojn post la Dua Mondmilito, kaj almenaŭ por mi, revekiĝo de demandoj pri kontraŭjudismo en tiu lando kiel en tiom da aliaj 'kristananaj' eŭropaj - antaŭ, dum kaj eĉ post la milito mem. Mi supozas, ke en la baltaj regionoj la antagonismo kontraŭ la Sovetunio estis la kialo por la bonvenigo de la germana invado; en ĉi tiu rakonto, tiu kontraŭ-rusa eco daŭras. Ankaŭ kaptas la junulojn la allogo de kapitalismo kontraŭ tiu de socialismo. Tre plaĉas al mi la akra videco de la aŭtoro ambaŭflanke de ĉiu argumento, ĉu politika, ĉu alia. De Trevor Steele ni atendas nenion malpli. Ankaŭ tre plaĉa estas la simpla, konciza, tute trafa stilo – la kutima, preskaŭ 'fabrikmarka'.

La rolantoj, do, estas el diversaj orienteŭropaj landoj – Estonio, Latvio, Ukraino, Rusio – kaj ankaŭ el Aŭstralio. Ĉu ili ĉiuj parolas la anglan? La rusan? Ne; ili ĉiuj estas - Esperantistoj! (Kaj por propagandi Esperanton mi ŝatus vidi anglan tradukon, kvankam mi timas, ke aĉetantoj de seriozaj libroj ne abundas en nia lando.) Travis (pron. *Trevis* de la neangloparolantoj) tre rapide sentas sin hejme en tiuj foraj landoj, ĝuste kiel Trevor dum siaj propraj travivaĵoj en tiuj, al ni, fremdejoj. La rakonto okazas en postmilita Talino, ankoraŭ aneksita parto de la (tiam ekonomie malforta) Sovetio, ne en la tagoj de Stalin, kvankam la KGB ankoraŭ ŝvebas... sed en tiuj de Gorbaĉov kaj Jelcin. Ĝuste kiel en Aŭstralio hodiaŭ, la junuloj sentas sin pro ekonomiaj kaj aliaj kialoj, ne kontentaj.



La titolo iom pensigis min: Amo inter Ruinoj. Ruinoj de kio? De postmilitaj landoj, de ekonomio, moraleco, espero? Certe temas pri seniluziiĝo. Kaj kio pri amo? Tute ne mankas amoro inter la gejunuloj; mi (idealisma?) trovis la rapidecon kun kiu ili kune enlitiĝis iom neromantika, sed tio estas la kutimo hodiaŭ kiel laŭdire ankaŭ dum tempo de premejo, ekzemple dum milito. Ĉu nia heroo de AIR trovis la veran amon? Nu, vi devos mem eltrovi. Dum mia dua tralego, trafis min multe kion mi preterlasis la unuan fojon. Do, mi invitas ankaŭ vin ekkoni Belindan, Virven, Marinan, Arimantason kaj aparte inter ĉiuj, Travison. Jen libreto de elstara Esperantisto por via persona lego-plezuro, kiel ankaŭ por senfina grupdiskutado.

Vi povas aĉeti de la eldonejo FEL >financo@fel.esperanto.be<. Pro la kosto de afranko, estus bone se pluraj homoj kombinu la mendon kaj pagu la afrankon nur unu fojon, dividita de x..... Feliĉan legadon kaj diskutadon.



Vera Payne



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendas vin.

La 5a de Aŭgusto estis la unua sabato. Venu. Lernantoj, vizitantoj ĉiam estas bonvenaj.



El Adelajdo



Sabaton, la 29-an de Julio, Norbert Bludau prelegis pri la art-ekspozio DOCUMENTA 14, kiun organizas ĉiujare la urbo Kassel (Germanio). La vizitanto kaj lia edzino pasigas en Adelajdo 9 tagojn kaj jam renkontis plurajn lokajn esperantistojn. Ĉi-foje ni estis en la domo de Indrani Beharry-Lall 11-ope.

Katja Steele

Prepoziciaĵoj kaj Proverbaĵoj. PROVERBAĴOJ.

Jen kelkaj proverbaĵoj ne konataj en Aŭstralio:

- 1). "Tiu kiu ne lernis fremdan lingvon, scias nenion pri sia propra." (Origine de Goethe: *'Wer fremde Sprachen nicht kennt, weiss nichts von seiner eigenen'*).
- 2). "La grekoj estas kia la genio: nome simplaj. Estas pro tio ke ili estas la eternaj instruantoj". (Origine de Nietzsche: *'Die Griechen sind, wie das Genie, einfach: deshalb sind sie die unsterblichen Lehrer'*).



3). “La grekoj traktis ĉiun metiaĵon kiel artaĵon, dum la romanoj traktis ĉiun artaĵon kiel metiaĵon”. (Marquardt).

4). Pri la grekoj: “Ni estas amantoj de beleco, sen troeco”. (Greka proverbo: *‘Filokalumen met’eŭtedeias’*).

PREPOZICIAĴOJ.

Vi scias, kio estas Prepozicio, nome ĝi difinas, priskribas, limigas, la signifon de substantivo aŭ verbo, aŭ kelkfoje de adjektivo aŭ adverbo, kiu substantivo k.t.p. menciatas tuj antaŭ la prepozicio kaj havas la nespecialan nomon Determinato. La Prepozicio faras tion kun la helpo de alia substantivo aŭ infinitivo kiu menciatas tuj malantaŭ la prepozicio. Ekzemple: “Mi havas tri arbojn en mia ĝardeno, unu antaŭ kaj du malantaŭ mia domo. Mi plej ŝatas LA ARBON EN LA ANTAŬĜARDENO sed mi ŝatas ankaŭ LA DU ARBOJN MALANTAŬ LA DOMO”. Temas pri du substantivoj, “arbon” kaj “arbojn” kiuj difinatas respektive de “en (la antaŭĝardeno)” kaj de “malantaŭ (la domo)”. La substantivoj “antaŭĝardeno” kaj “domo” difinas la prepoziciojn: ili ja diras “kia speco de “en” kaj kia speco de “malantaŭ”. (Pro tio oni eĉ povus diri, sed ne diras, “la antaŭĝardena en” kaj “la doma malantaŭ”). La prepozicio kun la ĝin sekvanta substantivo (aŭ infinitivo) nomiĝas prepozitivo kaj tiuj kune difinas la antaŭan “la arbon” resp. “la du arbojn”. Tiuj finaj Determinatoj, substantivo aŭ infinitivo aŭ adjektivo aŭ adverbo, povas anstataŭe difinati de kombinaĵo nomita “prepoziciaĵo”, konsistanta el unu prepozicio kaj unu reduktita prepozitivo. Oni bezonas tiujn prepoziciaĵojn, ĉar ne ekzistas sufiĉe da prepozicioj kaj ĉar oni ne ŝatas krei pli da prepozicioj por la pluraj sed neofte bezonataj rilatoj inter du substantivoj.

Ekzistas du specoj da tiaj kombinaĵoj, kaj en etnaj lingvoj nur la unua nomatas “prepoziciaĵo”. En tiu unua speco la signifo de la prepozicio plilarĝiĝas per la aldono de adverbo. Tia adverbo estas redukto de ekstra prepozitivo. Ekzemple “La ekskurso EN LA KADRO (= prepozitivo difinanta antaŭan “ekskurso”) DE (= simpla prepozicio) la kongreso”. La anstataŭa kombinaĵo “KADRE DE” nomiĝas Prepoziciaĵo, kiu praktike funkcias kiel unu prepozicio. Tiaj prepoziciaĵoj (“kadre de” k.t.p.) (angle: *prepositional phrases*) povas konsisti nur el adverbo kun prepozicio. En la angla pluivas pluraj el tiaj malnovaj prepoziciaĵoj origine same formitaj kiel nun en Esperanto, en kiu ili estas nemultaj sed popularaj: tempe de, kombine kun, responde al, k.t.p. Aliaj prepozicioj ol al kaj de kaj kun estas maloftege uzataj por tiu celo.

La dua speco de prepozicia kombino konsistas el du sisekvaj prepozicioj el kiuj la unua reprezentas malprecizan prepozitivan. Ekzemple “(Ni paŝis) AL ((iu loko)) EN (la domo)” kaj “(Ni promenis) ĜIS ((momento)) POST (sunsubiro)”. Ili korespondas al la anglaj kombinoj “into” k.t.p. kaj “until after” k.t.p. kaj uzatas en Esperanto iomete pli ofte ol en etnaj lingvoj. Alia ekzemplo: “La seminario okazos EL KUN la dudektria de Aprilo (= *from inclusive*) ĜIS KUN la dua de Majo (= *until including*). Se en tiaj kazoj la unua prepozicio estas “al”, ni povas anstataŭigi “al” per la akuzativo, do “Ni grimpis sur la monton” (por “al sur la monto”). Eĉ tian kombinaĵon de akuzativo plus prepozicio oni rajtas nomi “Prepoziciaĵo”, ĉar la funkcio de la akuzativo estas ekzakte la sama kiel de prepozicio.

Marcel Leereveld.



NOVAĴOJ/OPINIONOJ VIAJ



Ĉu la novaj leĝoj kontraŭ terorismo permesas detruigi la liberecon de bilionoj da homoj?

Oni akceptas ke aŭtoj mortigas milionojn da homoj.

Teroristoj mortigas nur centojn da homoj.

Ĉu Hitler gajnis sian potencon per la instigo de simila malamo? **Roger Springer**



Semajna raporto de Melburno

LUDVESPERO

Sabaton la 29a de Julio, kvin homoj kunvenis ĉe Alchemists Refuge por nia ludvespero. Ni komencis per skrablo, poste ludis la iomete maldecan ludon kartoĵoj kontraŭ Esperantujo, kaj finis per kelkaj raŭndoj de Spyfall.



DIMANĈA KUNVENO

Dimanĉon la 30a de Julio kvin homoj (inkluzive de gasto de Ballarat) kunvenis ĉe ACMI Cafe & Bar. Ni babilis kaj legis du amuzajn rakontetojn prenitaj de Facebook.

LUNDA KUNVENO

Lundon la 31a de Julio kvin homoj kunvenis ĉe Ross House. Ni babilis kaj tradukis iom pli da *Mil kaj unu noktoj*.

VENONTAJ KUNVENOJ

La dimanĉa kunveno ne okazos la 6an de Julio ĉar Petro kaj mi estos refoje en Brisbano. Mi ankaŭ kredas ke la ludvespero por Aŭgusto ne okazos; anstataŭe ni ekskursos al Warnambool, sed mi ankoraŭ ne finorganizis tion.

Lundon 7a de Aŭgusto je 18:30 [Lunda](#) kunveno, ĉe Ross House, 247 Flinders Lane

NUNAJ SEKVANTOJ (Alklaku la nomon por iĝi plua!)

[Meetup](#) – 873 [Instagram](#) – 83

[Facebook](#) – 297 [Telegram](#) – 20

[Twitter](#) – 27

Joanne Johns



Esperanto fariĝis 130 jaraĝa

la 26-an de Julio

“Unua Libro” estas la kutima nomo de la unua lernolibro de lingvo internacia Esperanto. Ĝin verkis L. L. Zamenhof sub la kaŝnomo D-ro Esperanto.

